



Tutmonda Biblioteko je la
memoro de L. Tolstoj.

..... № 10

PRI KIO LA STELOJ PAROLAS.

ARABA LEGENDO DE
J. NAĴIVIN.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas korektita de la anoj de Esper. Literat.-Asocio: S-ro Rev. J. A. Ashley (Anglujo), S-ro G. N. Baekmann (Svedujo), S-ino A. Deans (Skotlando), S-ro Br. R. (Norvegujo), S-ro R. Sharpe (Anglujo).

ELDONO № 1099 DE LA FIRMO
„POSREDNIK“ (PERANTO).

О ЧЕМЪ ГОВОРЯТЪ ЗВѢЗДЫ И. Наживина.

ВЪ ПЕРЕВОДЪ НА ЭСПЕРАНТО.

Издание „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1916.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

POR KIO ESTAS ELDONATA „TUTMONDA BIBLIOTEKO JE
LA MEMORO DE L. TOLSTOJ“.

„Unu animo en ĉiuj“,—vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo „Posrednik“ (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata „Tutmonda Biblioteko“ kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolàeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de „Tutmonda Biblioteko“, kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de „Tutmonda Biblioteko“ en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo „Posrednik“

I. Gorbunov-Posadov.

Moskvo, Arbat, 36.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 10.

PRI KIO LA STELOJ PAROLAS.

ARABA LEGENDO DE

J. Naĵivin.

*Tradukis el la rusa lingvo
N. Kabanov.*

La traduko estas: korektita de la anoj de Esper. Literat. Asocio: S-ro Rev. J. A. Ashley (Anglujo), S-ro G. H. Backmann (Svedujo), S-ino A. Deans (Skotlando), S-ro Br. R. (Norvegujo), S-ro R. Sharpe (Anglujo).

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata
de d-ro N. Kabanov.

ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1099.

Moskvo, 1915.



PRI KIO LA STELOJ PAROLAS.



Типо-литографія Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К°. Пименовская ул., соб. д.
МОСКВА—1915.

PRI KIO LA STELOJ PAROLAS.

I.

En antikvaj tempoj potenca reĝo vivis en Azio. En juna aĝo li jam okupis tronon de siaj prauloj, plena je varmega deziro fari sian popolon feliĉa,—li volis, ke en la limoj de lia vasta regno, de maro ĝis maro, homoj forgesu, kio estas sufero, malĝojo, larmoj... Li vekigadis pli frue, ol pluganto kaj kuŝigadis post ĉiuj, kaj li uzadis tutan sian tempon por zorgado pri feliĉo de la popolo. Sed jaroj pasadis post jaroj, kaj la celo, kiun la bona reĝo starigis al si, ŝajnis senfine malproksima, kiel antaŭe; se li sukcesis per siaj laboroj plibonigi staton de homoj en unu senco, la stato plimalbonigadis en alia senco: malbono ne permesadis ke li venku ĝin kaj, neaten-dite ŝanĝante formon, kvazaŭ incitante batalanton, malbono forigadis de liaj persekutoj. Necese estis denove batali, batali senfine kaj sen rezultato: malĝojo, mizero ne malaperis, larmoj ne ĉesis flui en la regno, malgraŭ ĉiuj penoj de la reĝo, kaj la reĝo malfortiĝis en la nelaŭforta batalo kaj eksopiris... Edzinoj kaj korteganoj vane penis distri lin per ĉasadoj je bengalaj tigroj, je potencaj elefan-

toj, per dancadoj de dancistinoj, per milito,—la reĝo estis malgaja: lia bona koro doloris pro suferoj de la popolo kaj pro konscio, ke li estas senpova por helpi ĝin.

Laŭ lia ordono, plej saĝaj maljunuloj estis kunvokitaj el ĉiuj flankoj de la regno al la reĝo por konsilo, kaj la reĝo eklaboris kun nova energio. Kune kun la maljunuloj li prijuĝadis ĉiujn aferojn de la regno, eldonadis novajn leĝojn, esploradis, kiel ili efikas, kaj se ili efikis malbone, li nuligadis ilin kaj faradis ĉiam novajn, ĉiam pli bonajn, kiel ŝajnis al li; li mem kun la maljunuloj juĝis, li mem observis en la tuta regno oficistojn, kiuj devis severe observi la plenumadon de la reĝaj leĝoj. Li ĉesigis la militojn, forlasis siajn amatajn edzinojn, forlasis ĉiujn amuziĝojn kaj li tute sin donis al nobla laboro por utilo de homoj. Kaj dum senlaca laboro, dum senĉesaj zorgoj la reĝo eĉ ne rimarkis, kiel jaroj pasis kaj kiel li maljuniĝis. Lia kapo, plena je pensoj, estis jam blanka, kiel neĝo de montaj suproj; la granda arĝentkolora barbo estis malsupreniĝanta sur la larĝan potencon bruston, en kiu, kiel antaŭe, la koro, plena je amo, batis kun juneca varmego, kaj iafoje li profunde sopiris. Kaj tiu ĉi sopiro plenigadis ĉiam pli la animon de la maljuna reĝo, ĉar li vidis, li ne povis ne vidi, ne povis kaŝi de si, ke liaj laboroj tamen ne atingas la deziratan celon: lia regno estis granda kaj potenca, riĉaĵoj de liaj loĝantoj estis ĉie famekonataj, artoj kaj sciencoj atingis eksterordinaran gradon de disvolviĝo; sed la reĝo komprenis, ke tio estas ne ĉio, ke tio estas malmulta, ke feliĉo estas ne en tio, ĉar, kiel an-

taŭe, larmoj kaj sango de homoj verŝiĝas en lia regno kaj iliaj suferoj ne ĉesas... Sed tamen la maljuna reĝo ne volis konfesi sin venkita kaj streĉis ĉiujn siajn fortojn, por atingi la starigitan celon, kaj en tiu ĉi lia batalo per lastaj fortoj estis multaj duboj, multaj turmentiĝoj. Jen ŝajnis al li, ke la plenumantoj de liaj ordonoj, liaj oficistoj, estas elektitaj de li ne sufiĉe bone, kaj li ŝanĝis ilin, elektis novajn, por denove anstataŭigi ilin per novaj aŭ eĉ per malnovaj; jen li opiniis, ke la tuta malbono devenas de tio, ke malobeoj al leĝoj estas punataj tre malsevere, jen male la leĝo ŝajnis al li tro severa por la malfortaj homoj; jen ŝajnis al li, ke necese estas antaŭzorgi per leĝo ĉian paŝon, ĉian ekspiron de homoj; jen male li opiniis, ke en lia lando estas tro multe da leĝoj, tro multe da punantoj, tro multe da malliberejoj... Li provis ĉiujn rimedojn, por mem eliri el malfacila stato kaj eligi milionojn da homoj, sin konfidintaj al li; tutajn noktojn li pasigis sen dormo, meditante pri tio, kion fari, serĉante savon, sed li trovis nenion. Kaj iafoje komencis ŝajni al li, ke malbono en interrilatoj de homoj kaj iliaj devenantaj de tio suferoj estas neeviteblaj, ke ne estas kaj ne povas esti tiaj leĝoj, kiaj povus fari vivon de homoj ĝoja... Sed io protestis en la animo de la reĝo kontraŭ tiu ĉi konkludo kaj igis lin ĉiam denove trameditadi siajn pensojn, ĉiam denove serĉi...

Kaj jaroj pasadis... La morto estis nemalproksima... la penso, ke li mortos, ne trovinte savon por homoj, turmentis netolereble la koron de la maljuna reĝo; sed li ne sciis, kion fari... Kaj en malespero li forlasis subite

ĉiujn siajn aferojn, kaj disbatita, malsana, li ekiris sian eksterurban palacon por, almenaŭ iomete, ripozi de turmentantaj lin pensoj kaj zorgoj meze de sovaĝaj belaĵoj de montoj kaj de arbaroj, ĉirkaŭantaj lian marmoran palacon...

II.

Estis silenta nokto... La maljuna reĝo, turmentata de sendormeco, sin levis de la lito kaj mallaŭte eliris sur la vastan terason de la palaco. Grandaj marmoraj kolonoj altis ĉirkaŭ li kvazaŭ mallaŭta arbaro, kaj ŝajnis arĝentaj en lumo de la luno... La maljuna reĝo sin mallevis sur trankvilan molan kuŝejon kaj, malfacile ekspirante, li ekrigardis en malluman profundon de la senfina parko, plenan je malklaraj apenaŭ rimarkeblaj ekspiroj de maljunaj arboj kaj je mistera murmuro de nevideblaj en mallumo fontanoj. Kaj super la mallumaĵo de la parko delikate arĝentis profundego de la ĉielo, kie la ĉarma luno naĝis kaj la kolorŝanĝantaj steloj rakontadis al la dormanta tero arĝentajn purajn fabelojn... Apud la teraso meze de luksa akvofalo de rozoj, nevidebla poeto de verda regno, grilo, kantis pri io, kaj ŝajnis al la maljuna reĝo, ke la grilo estas tre feliĉa pro io...

Kaj la maljuna reĝo denove ekspiris profunde, malfacile... Levinte iom sian grizan kapon li levis la okulojn al la fajreranta ĉielo kaj transkondukis ilin de unu stelo al alia, kvazaŭ penante aŭskulti, diveni ilian mallaŭtan misteran murmuron. Kaj iom post iom, nerimarkeble, liaj nigraj pensoj foriĝis ien, kvazaŭ degelis en

arĝentaj radioj, kaj io senfine trankvila, solena, serena ekversigis de la ĉielo en la laciĝintan animon de la maljunulo, ia feliĉo, ia floranta parfuma freŝeco de printempo ekblovetis en ĝin... Kaj subite amo ekbruletis en la koro... Al kiu, al kio?... Al tiuj ĉi malproksimaj steloj, al tiuj ĉi maljunaj arboj, al tiuj ĉi murmuroj kaj ekspiroj, al tiu ĉi malgranda feliĉa grilo, al tuta tiu ĉi ĉielo, al la tuta vivo, la tuta mondo, la tuta universo, al Dio... Kaj la maljuna reĝo, emociita, kortuŝita de tiu ĉi universala nekomprenebla amo, de tiu ĉi proksimeco al Dio, kun larmoj sur la okuloj, rigardis la stelojn, la malklaran malproksimon de l'arbaroj, la altajn montojn kun mallumaj karavanoj de nuboj, aŭskultis la kvietan misteran pulsobaton de vivo ĉirkaŭ si, ĝian majestatan iradon meze de la stelaj kampoj de la senlimaĵo, kaj sin sentis senfine feliĉa kaj serena, sin sentis simile al tiu ĉi trankvila delikata ĉielo, ĉirkaŭprenanta la dormantan teron kviete kaj ame. Kaj tiel same, kiel al la ĉielo, ŝajnis al li ĉiuj zorgoj kaj klopodoj de la vivo nun malproksimaj, malnecesaj, strangaj. Li komprenis nun, ke tio estas ne vera vivo, ke ĝi estas turmenta dormo, trompo, ke estas ia alia, vera, serena vivo, kiu vokis lin... Kaj amo ĉiam pli brulis en lia animo; li sentis en la lumo de la steloj, ke li amas, senlime amas ĉion, ke tio—tiuj ĉi steloj, tiu ĉi ĉielo, tiu ĉi grilo meze de roskovritaj floroj, tiuj ĉi montoj—sentime amas lin, maljunan turmentigintan reĝon, kaj li ĉesis senti sin aparta estaĵo, kaj kiel ondo, kiel guto, li kunfluiĝis kun la mondo, kun Dio, en tiu ĉi senlima hela oceano de amo...

Ekspiro de la feliĉo eliĝis el la brusto de la maljuna reĝo, kaj kvazaŭ rekonsciiginte li revenis el stelaj kampoj teren, revenis kun io nova kaj ĝoja; la amo, brulanta en lia animo, estis,—kiel li sentis,—matena ĉielruĝo de ia granda vero, kiu estas tuj lumigonta lin...

Amo...

Li amas ĉion, kaj ĉio amas lin... Ĉio amas, ĉio en noktomeza silento antaŭ supre lumeganta trono de Dio... kaj tuta vivo estas en tiu ĉi universala amo, en tiu ĉi proksimeco al la steloj kaj al Dio,—nur ĝi donas feliĉon, sekve nur ĝi sola estas grava kaj necesa...

III.

Sekvantan festan tagon, ĉe solenaj sonoj de sonoraj tuboj, sur ĉiuj placoj, sur stratkruciĝoj de la luksa ĉefurbo heroldoj proklamis alvokon de la maljuna reĝo al popolo.

„La reĝo vidis profetan sonĝon,—la heroldoj proklamis,—ke gravaj ŝanĝoj de sortoj de lia regno devas fariĝi en proksima estonteco. Kiaj devas esti tiuj ĉi ŝanĝoj, kaŝitaj en sekvoplena estonteco, nur tiu sciigos,—tiel sonĝis la reĝo,—kiu divenos misteran sencon de oraj skribaĵoj de nokta ĉielo. Pro tio la reĝo ordonas, ke ĉiuj kaj ĉiu en limoj de lia regno, de maro ĝis maro, ĉiun vesperon, de sunsubiro ĝis noktomezo, rigardu atente la ĉielon kaj penu diveni ĝian sekreton. La unua, kiu malkaŝos al la reĝo tiun ĉi sekreton, estos rekompencata tiel, kiel li mem deziros. Volo de la reĝo estas deviga por ĉiuj—la heroldoj proklamis,—post vespera preĝo ĉiuj eliru el la

domoj kaj divenu la sekreton de la steloj; eliru mal-liberuloj kaj iliaj gardistoj, pastroj, militistoj, riĉaj komercistoj, plugistoj kaj nobelaj grandsinjoroj, fraŭlinoj, maljunuloj, junuloj, patrinoj kun suĉinfanoj kaj eĉ malsanuloj, kiuj povas ankoraŭ sin movi,—ĉiuj, ĉiuj!“

La sonoraj tuboj denove eksonis, kaj la heroldoj revenis la marmoran palacon, por tuj ekgalopi sur rapidkuraj ĉevaloj ĉiujn urbojn, vilaĝojn kaj eĉ plej malgrandajn vilaĝetojn por anonci la volon de la granda reĝo...

Maltrankviligita per la profeta sonĝo de la reĝo, la popolo en granda ekscitiĝo disiris hejmojn kaj ĵus kiam la hela suno sin kasis post malproksimaj bluaj montoj, ĉiuj eliris stratojn, ĝardenojn, platajn tegmentojn de siaj domoj, por plej baldaŭ sciigi de la ĉielo, kio estas kaŝita en la estonteco. Kaj tuj laŭ ordono de la reĝo specialaj senditoj ekiris ĉiujn flankojn sur mallumaj stratoj de la ĉefurbo; la reĝo ordonis al ili observi popolon: ĉu ne dormas ie iu maldiligenta aŭ indiferenta al reĝa rekompenco kaj al sortoj de sia lando...

Mallaŭteco estis en la grandega urbo; en blua malhelo aŭdiĝis nur spirado kaj mallaŭtaj ekspiroj de miloj da homoj, alkatentitaj per la okuloj al la brilanta profundo de la universo... Kaj ŝajnis, ke iaj arĝentaj puraj fantomoj flugis super la senparolaj amasoj de la popolo kaj sendis en animojn, malfermigantajn ĉe spirado de la ĉielo, iajn malklarajn, sed bonegajn pensojn...

Kaj en densa loko de la malluma parko, ĉirkaŭanta de ĉiuj flankoj la blankan marmoran palacon, ia ombro staris senmove, rigardante ĉielon tra malhela punto

de palmaj branĉoj kaj iafoje mallaŭta maljunula murmurito aŭdiĝis en mallumo kune kun profunda interrompa ekspiro:

— Granda, Ĉiopova, kompatu ilin! Malfermu al ili Vian volon!..

Noktomeze la reĝaj senditoj revenis la palacon kaj sciigis al la reĝo, ke la tuta popolo plenumis lian ordonon, sed neniu divenis sekreton de la ĉielo.

La reĝo permesis al ili foriri, kaj, restinte sola, denove levis la okulojn al la brilanta ĉielo kaj ekmurmuretis kun mallaŭta sopiro:

— Ĉu efektive ili ne komprenos?.. Kompatu ilin, Granda!..

IV.

Matene la estro de la urbo sciigis al la reĝo, ke unu gardisto foriĝis el malliberejo. Ĵus kiam la suno leviĝis, li aliris al unu el la gardestarantaj kamaradoj, diris, ke li ne volas plu esti mallibereja gardisto, fordonis al li armilon kaj foriris nesciate kien... Oni diras, ke oni vidis lin ekster urbaj pordegoj,—li iris al la malproksimaj arbaroj...

La koro de la maljuna reĝo forte ekbatis, kvazaŭ varmigita per io, kaj li diris:

— Tio estas bone...

Iom miranta, la estro demandis:

— Ĉu la granda reĝo ordonos aranĝi persekuton?

— Ne, ne estas necese...—la reĝo respondis, kaj, nur ordoninte al la miranta estro, ke denove, kun ko-

menco de la nokto, ĉiuj eliru por rigardi ĉielon, permesis al li foriri.

Ministro raportis al li, ke rikoltado de grenoj kaj kolektado de fruktoj estas ĉie finitaj kaj ke estas ĝustatempe komenci kolektadon de aŭtunaj impostoj.

— Eble estas prokrasti ĝin...—diris la reĝo.

— Sed, granda reĝo, nia regna kaso konsumiĝas,—kontraŭparolis la ministro kun respekto,—kaj ni devas kolekti militistaron: via fidela subulo jam raportis al vi, granda reĝo, ke apud nia norda limo estas netrankvile,—ŝajnas, ke najbaroj sin pretigas por milito...

— Nu, aranĝu tien grandan senditaron, kaj ĝi forveturigu al ili mian fratan saluton kaj korajn bondezirojn de paco kaj de feliĉo...—respondis la maljuna reĝo.—Kaj la senditaro prenu kun si plej bonajn donacojn: rapidkurajn ĉevalojn, karajn felojn, parfumajn mielojn, diverskolorajn juvelojn kaj ĉion, kion plej bonan vi trovos en miaj trezorejoj... Kaj ke la senditoj ne forgesu plej ĉefan,—mian fratan saluton...

La mireganta ministro faris salutan ekklinon kaj elirinte tuj komencis plenumi la reĝan ordonon, kaj tiun tempon la reĝo aŭskultis raportojn de aliaj estroj kaj ministroj, kaj ripozinte ekiris en juĝejan salonon: ĉiam li mem juĝis plej gravajn krimulojn.

La gardistoj salutis la reĝon; li sidiĝis sur sian altan oran tronon kaj faris signon. La gardistoj enkondukis tra flanka pordo enkatenigitan palan viron.

— Tiu ĉi viro parolis pri vi, granda reĝo, arogantajn vortojn...—laŭtvoĉe diris maljuna estro de supra juĝejo.

— Verŝajne, iu aŭ io kolerigis lin,—diris la reĝo,—
ĉar mi vidas laŭ lia vizaĝo, ke li estas tre bona homo.
Ĉu ja tio estas vero, mia amiko?—li turnis sin al la
juĝato.

Preskaŭ perdinte konscion pri mirego, la pala homo,
tintante per katenoj, respondis laŭte, varmege, per tre-
manta voĉo:

— Jes, reĝo, mi estis kolerigita...

— Nu, jen... Mi ja sciis... — la reĝo interrompis
lin.—Mi tuj ekvidis, ke li estas tre bona homo. Demetu
de li katenojn plej rapide, nutru lin kaj donu al li
ĉion, kion li bezonas... Iru kun paco, mia amiko...

Ĉiuj interrigardis kun mirego.

La pala homo volis diri ion, sed ne povis, kaj
kaŝinte la vizaĝon per la manoj, li eliris malrapide el
la juĝeja salono.

— Enkonduku alian!—ordonis la reĝo.

Kaj alia, je la mirego de ĉiuj ĉeestantoj, montriĝis, laŭ
vortoj de la reĝo, tre bona homo, kvankam li mortigis
sian fraton en stato de kolerego... La reĝo ordonis for-
liberigi lin...

Tiel li forliberigis sen puno ĉiujn krimulojn, juĝatajn
tiun tagon, ordonis nutri, trinkigi ĉiujn ilin kaj doni
al ili ĉion necesan... Poste li revenis sian palacon.

Kaj nokte, dum miloj da homoj penis diveni orajn
skribaĵojn de la ĉielo, varmega preĝo denove aŭdiĝis
en profundo de la malluma parko:

— Granda, Ĉiopova, kompatu ilin! Malfermu al ili
Vian volon!..

V.

Tiel pasis ankoraŭ unu semajno, dua, kaj io nova
fariĝis rimarkata en vivo de homoj,—ili iradis meditan-
taj, enpensiĝintaj, kaj ia kvieteco estis nun en iliaj in-
terrilatoj... Kaj tiun saman tempon ia malklara mal-
trankvilego sentiĝis en tiu ĉi mallaŭteco de homaj ani-
moj,—ĉiuj kvazaŭ atendis ion...

Laŭ moro, plenumata de antikvaj tempoj, la reĝo
traveturadis ĉiun tagon tra la urbo, nun preferante plej
malriĉajn kvartalojn. Tie li disdonadis multon da mono
al senhavuloj, li revenigis el militistaro al unu maljunu-
lino ŝian filon, kiu nutris ŝin per sia laboro, ordonis al
ĉiuj siaj kuracistoj viziti malriĉajn malsanulojn, tre
zorgis malgrandajn infanojn kaj tiamaniere dum kelkaj
tagoj li kreis ĉirkaŭ si varman kaj helan atmosferon
de amo...

Kelkaj punlaborantoj forkuris el malliberejo en ĉeesto
de ĉiuj, kaj neniu eĉ provis haltigi ilin; unu riĉa grand-
sinjoro disdonis ĉiujn siajn riĉaĵojn al malriĉuloj kaj mem
foriĝis ien; alia riĉa viro venis malliberejon, petis de
ĉiuj siaj ŝuldantoj, kiuj estis en malliberejo, pardonon
kaj forliberigis ilin. Unu famekonata grizhara saĝulo,
kiu instruis homojn dum tuta sia vivo, ke ili estas krei-
taj el la tero kaj revenos en teron, kaj konsilis al ili pro
tio large ĝui ĉiujn plezurojn de ilia vivo-momento,
neatendite de ĉiuj anoncis sian doktrinon erara: ĉe la lumo
de la steloj li ekvidis, ke en homo estas ankoraŭ io, krom

tero. Eĉ astrologoj, elstudintaj en la ĉielo, laŭ iliaj diroj, ĉion, kion nur eble estas elstudi, nun konfesis, ke ili ne rimarkis la plej gravan sekreton de la helaj mondoj, kiun ili nun eksentis...

Kaj malklara maltrankviliĝo, atendo de io ĉiam pli-grandiĝis...

La reĝaj senditoj, observantaj ke ĉiuj rigardu la ĉielon dum vesperoj, ĉiam pli malofte venis al la reĝo kun raportoj. Unufoje, nokte, la reĝo nerimarkate eliris el la palaco, por rigardi, kiel ili plenumas sian devon, kaj li trovis ilin ĉiujn sur stratoj de la urbo; sed ili kvazaŭ forgesis pri la afero, kiu estis komisiita al ili, kaj meze de senparola amaso de la popolo ili rigardis la stelojn en profunda enpensado...

Tiun tempon la pastroj jam kelkfoje kunvenis ĉe la ĉefa pastro kaj sekrete interkonsiliĝis kun li pri io. Kaj jen, unufoje, matene, maljuna pastro venis palacon kaj, renkontita kun granda respekto,—la pastroj havis en la regno grandan influon,—rekte trairis al la reĝo.

La maljuna pastro estis tre ekscitiĝinta kaj venis por averti la reĝon, ke interparolo de homoj kun la ĉielo povas alkonduki al malbonaj sekvoj.

— Kion ĉio tio ĉi signifas, mi ne povas kompreni,—malĝoje diris la maljuna pastro... Niaj preĝejoj ĉiutage fariĝas ĉiam malpli vizitataj...

— Tio, kion vi diras, mia frato, estas tre grava,—respondis la reĝo.—Pri tio necese estas mediti... Venu al mi hodiaŭ kun pastroj post vespera preĝo, kaj ni interparolos.

— Mi opinias, granda reĝo, ke simple necese estas nuligi vian ordonon diveni la sekreton de la steloj,—diris la maljuna pastro.—Kaj ne nur nuligi ĝin, tio estas malmulta,—necese estas malpermesi al la homoj rigardi la ĉielon. Mi estas certiĝinta, ke senpera interkomunikiĝo de ili kun la ĉielo ne alkondukos al bono,—ili bezonas perantojn, alie la lumo de Dia majesteco blindigos iliajn malfortajn okulojn...

— Sed vi forgesas pri mia sonĝo... diris la reĝo.—Mi devas scii, kia sorto atendas mian popolon...

La ĉefa pastro mallevis la okulojn, kvazaŭ komprenigante la reĝon, ke li ne kredas lian sonĝon, kaj ne-laŭte, kun profunde kaŝita minaco li diris post nelonga silento:

— La pastroj plendas, granda reĝo!

— Necese estas mediti... ripetis la reĝo.—Kaj vespere venu al mi kun ili, ni priparolos, pripensos, kion necese estas fari.

La ĉefa pastro ne insistis kaj, silente ekklininte sin antaŭ la reĝo je signo de obeo, li, severa, majesta, eliris el la palaco.

VI.

Vesperon de tiu tago, post preĝo, kiam miloj da homoj, ĉarmitaj, rigardis la arĝentkoloran profundon de la ĉiela sekreto, la pastroj kun la ĉefa pastro kunvenis ĉe la reĝo. Majestaj, ili grave sidiĝis sur la larĝa teraso de la palaco kaj iliaj mallumaj senmovaj figuroj ĉe malforta lumo de la steloj ŝajnis ŝtonaj malvarmaj skulptaĵoj.

— Mi atendas vian vorton, granda reĝo... — grave ekparolis la ĉefa pastro.

— Vi diris al mi, mia frato, ke proksimeco de la ĉielo estas danĝera por malfortaj homoj,—diris la maljuna reĝo.—Se estas tiel, mi estas preta malpermesi al ili interparoli kun la steloj, sed tiaokaze vi, pastroj, devas tuj diveni al mi la sekreton de la steloj. Mi opinias, ke tio estos facila por vi,—ja vi diras, ke vi estas proksimaj al la ĉielo... Kio estas skribita tie?—la reĝo montris per la mano malluman alton, en kiu oraj lumiloj, disĵetitaj en senlima spaco, kviete lumetis antaŭ trono de la Nekomprenebla.—Kion signifas tiuj ĉi oraj skribaĵoj?..

La pastroj nevole levis la okulojn al la ĉielo...

— Tio estas nur ĉielo, reĝo,—severe respondis la ĉefa pastro,—kaj nenia sekreta senco estas en iliaj fantaziaj desegnoj, kaj se ĝi estus, ne laŭforte estus [al malforta homa saĝo diveni ĝin.

— Se ne estas senco en ili aŭ se tiu ĉi senco estas ne laŭforta al homoj, pro kio vi tiel timas proksimecon de homoj al la ĉielo?—demandis la reĝo.

La maljuna pastro konfuziĝis.

— Ĝi igas ilin forgesi pri Dio...

— Dia ĉielo?—demandis la reĝo.

— Preĝejoj de Dio fariĝas nevizitataj...

— Klarigu al mi, pro kio...—respondis la reĝo.—Sekve, en ĉielo estas io, kio igas homojn forgesi pri ĉio tera?

La pastro ne havis tempon respondi ion, ĉar tiun ĉi

momenton maljuna servanto de la reĝo eniris sur la terason kaj diris:

— Granda reĝo, ia vojiranto, tuta en polvo, volas tuj paroli kun vi.

— Li eniru.

La servanto, farinte salutan ekklinon, foriris, kaj tuj ia viro suriris la terason kaj haltis nedecide.

— Aliru pli proksimen, mia amiko,—afable diris la reĝo.

La malluma ombro alproksimiĝis al tiu loko, kie sidis la pastroj kaj la reĝo.

Kiu vi estas?—demandis la reĝo.

— Mi estis soldato, gardisto en malliberejo...—respondis la ombro.

— Ĉu vi estas tiu sama, kiu forkuris de gardostarado antaŭ du semajnoj?

— Jes, mi estas tiu sama,—respondis la ombro.—Vi povas ekzekuti min poste pro forkuro, sed antaŭe aŭskultu: mi sciiĝis sekreton de la ĉielo...

— Mi scias tion ĉi...—nelaŭte elparolis la maljuna reĝo.

— Vi scias?—mirege ripetis la forkurinto kaj tuj aldiris kun ĝojo:—mi opiniis tion ĉi... al mi ŝajnis, ke vi scias... ĉar vi igis homojn rigardi ĉielon,—sekve vi sciiĝis ĝian sekreton kaj volis, ke ĉiuj sciiĝu ĝin... Jes, jes, ĉar estas neeble, unufoje sciiĝinte, kaŝi ĝin de homoj, estas neeble!

— Rakontu al mi, kiel ĝi okazis...—diris la reĝo.

— Aŭskultu, ĉar devo igas min nun rakonti pri tio...—respondis la veninto.—Aŭskultu...

VII.

— Vesperon de tiu tago, kiam estis anoncita la reĝa ordono al ĉiuj homoj diveni sekreton de la ĉielo,—komencis la veninto, sin apogante al marmora kolono,—ĉiuj malliberuloj estis elkondukitaj el la malliberejo sur la korton, de kiu la tuta ĉielo estis videbla, kaj gardistoj stariĝis laŭ la muroj. Mi staris sur la angula turo, alte-alte super tero, kiu kuŝis sub mi mallaŭta kaj nigra, kiel profundegaĵo, kaj mi rigardis la stelojn. Kaj iom post iom mi komencis forgesi, ke mi estas gardisto, soldato, ke mi staras sur la turo; mi sentis min apartiĝinta de tero, solulo meze de tiuj ĉi stelaj kampoj, kaj estis al mi iel penige kaj turmente malĝoje... Kaj mi ne komprenis, pro kio estas al mi tiel malĝoje meze de la steloj, kaj mi demandis ilin pri tio, kaj ne komprenis tion, kion ili murmuretis al mi tiel delikate. Kaj ke ili murmuretis, parolis al mi, tion mi sentis, sciis, kaj penis kompreni, sed ne komprenis, kaj fariĝadis al mi ĉiam pli malĝoje. Kaj mi malleviis mian rigardon de la stela mondo en min mem, kaj kia malgranda, mizera, malpurigita eksajnis al mi mia animo kompare kun tuta tiu ĉi belegajo! Tuta mia vivo rapide prezentiĝis al mi, mi ekhontis pri ĝi, ekhontis pri mi mem. Kaj apenaŭ mi sciigis, kia pekulo mi estas, la steloj eklumis pli hele kaj ekkomencis kolorŝanĝi—kvazaŭ ili ekĝojis, ke mi sciigis tion. Kaj mi denove rigardis ilin, plena je ravo, forgesinte ĉion. Kaj subite—tintado de katenoj malsupre. Mi ektremis, kva-

zaŭ rekonsciiĝis kaj ekrigardis teron, pri kiu mi preskaŭ tute forgesis. Tie, sur la malluma korto, staris homoj, multaj homoj, kunpremitaj per altaj ŝtonaj muroj. Iliaj vizaĝoj estis levitaj al la ĉielo kaj, lumigitaj per malforta brileto de la steloj, ŝajnis palaj kiel ĉe malvivuloj, aŭ, pli vere, kiel ĉe sanktaj ermitoj. Jes, jes—kiel ĉe sanktuloj!.. Ĉu vi rimarkis iam, ke plej simpla ordinara vizaĝo fariĝas eksterordinara, kiam homo rigardas supren?.. Kvazaŭ trankvila penso de la ĉielo reflektiĝas en li... Tio sama okazis al tiuj ĉi homoj: kiaj malĝojaj, kvietaj, bonaj vizaĝoj estis nun ĉe ĉiuj ili! Iliaj katenoj denove ektintis malforte; kaj al mi fariĝis dolore, ĝis turmentigo dolore: pro kio ili estas en katenoj, tiuj ĉi homoj kun bonaj belaj vizaĝoj? Por kio oni turmentas ilin? Kaj kiu? Mi, mi mem, tia pekulo, tiel malinda, kulpa!.. Kiu donis al mi tiun ĉi rajton? Kiel ĝi okazis?.. En serĉado de la respondo mi levis la okulojn al la ĉielo: ĉiuj steloj tintis per kvieta ĝoja rido, amante karesis min per siaj subtilaj delikataj radioj kaj ĝojis, ĝojis senfine. Kaj subite ia stranga rido eliĝis el mia brusto, kaj larmoj ekfluis el la okuloj...

Tiam eksonis noktomezon. Necese estis fermi malliberulojn en malliberejo kaj iri por dormi,—noktomeze gardistarantoj ŝanĝiĝas. Sed mi ne ekiris por dormi, kaj restis sola sur senhoma korto, kaj, kaŝinte min en ombro de alta muro, mi rigardis la ĉielon kaj pensis, kaj subite mi rememoris pri via songo, granda reĝo, pri ĉiela sekreto, kiun necese estis diveni.

Mi sciis... ne, mi sentis nun, en kio estas tiu ĉi se-

kreto; mi aŭdis ĝin en la ĉielo, en tiuj palaj vizaĝoj kaj en mia koro. Sed al mi estis ne suface senti ĝin en mi kaj en ĉio ĉirkaŭanta; mi devis paroli pri ĝi al homoj, divenigi al ili la sekreton de la ĉielo, trovi necesan vorton... La sekreto postulis sian evidentiĝon...

Ĉe sunleviĝo mi denove iris por gardostarado, sed preninte glavon en la manojn, por zone surmeti ĝin, mi rememoris pri la palaj vizaĝoj de la malliberuloj kaj — fordonis armilon al la kamarado, kaj mem mi foriris el la malliberejo kien ajn... Ni supozu, ke ili estas pekuloj, mi pensis, sed mi ja mem estas pekulo... Multajn tagojn mi vagis en sovaĝaj dezertoj kaj inter homoj kaj ĉiam meditis, meditis, ĝis kiam mi fine trovis tiun ĉi vorton...

— Tiu ĉi vorto?—nelaŭte demandis la reĝo.

— Amo!

La maljuna reĝo rapide sin levis de sia sidejo, aliris al forkurinto kaj enbrakigis lin.

— Vi divenis... li diris emociite.—Ho ve! sola, vi sola el ĉiuj!

— Ho ne, reĝo!—rapide respondis tiu.—Jam multaj, multaj scias pri tio ĉi, multaj komprenis tion, kion la steloj parolas, ke vivo estas amo, ke ekster amo ne estas vivo,—amo de ĉio al ĉio, amo sen fino! Oni komprenis, ke ni ĉiuj devas fariĝi similaj al steloj, fariĝi tiaj samaj serenaj, kvietaj, trankvilaj, kaj ame kunfandiĝi per radioj de niaj animoj unuj kun aliaj, kun la steloj, kun la tuta universo...

— Sed pro kio ili silentas?!—ekkriis la reĝo, emociite.

— Ili ne silentas, ili parolas, — respondis la veninto. — Sed ili ĉiam ankoraŭ ne kredas al si, — ja ĉio antaŭa falas! Ja necese estas ekpeni por naskiĝi en tiun ĉi novan vivon... Necese estas venki multon...

— Kaj ili venkos?

— Ho, jes!

Mallonga, emociplena silento fariĝis.

— Miaj heroldoj promesis rekompenco por malkaŝo de la sekreto,—elparolis la reĝo, provante la veninton.

Tiu nelaŭte ekridis responde.

— Sed kion vi povas doni al mi?—li diris.—Ja tuta universo apartenas al mi, vekiĝinta...

Subite unu el la mallumaj ombroj rapide rektiĝis.

— Li estas prava!...—ekkriis unu el junaj pastroj, brilante en mallumo [per fajroplenaj okuloj.—Li estas prava.

La pastroj, konsternitaj per neatenditaĵo, rapide sin levis de siaj lokoj kaj sin ĵetis al la arogantulo, kvazaŭ dezirante estingi fajron de liaj vortoj, ekflamintaj en mallumo.

— Rekonsciiĝu, sensaĝulo,—kion vi parolas?! Silentu!.. Vi freneziĝis!..—ekaŭdiĝis maltrankvilaj koleraj ekkrioj.—Silentu, silentu! Kia eraro!..

— Li estas prava!... ekkriis la juna pastro al la surpaŝantaj sur lin mallumaj ombroj.—Mi mem legis ĉion tion ĉi en la ĉielo kaj en la homoj, kaj en mia koro, sed mi timis konfesi tion ĉi al mi mem, mi ne kredis al mi, ĉar estas eble konfesi tion ĉi nur kondamninte sin, kaj tio estas laŭforta ne al ĉiu... Vi estas prava, mia frato!..

Jes, vivo estas amo, kaj ĉio, kio ne estas amo, estas mensogo, trompo, mallumo!.. Ĉio!.. Amu ĉiujn kaj ĉion, pardonu al ĉiuj kaj ĉion—en tio ĉi estas tuta leĝo kaj profetoj...

— Herezulo!.. ekkriegis la pastroj.

— Apostato!

— Sur lignofajron lin!.. ekkriis la ĉefa pastro en furiozo. Kaj subite ĉiuj eksilentis.

— Kio ĝi estas?..

VIII.

Juna voĉo, pura, kiel monta fonto, plena je senfina entuziasmo, flue supreniĝis el-post mallumaj masoj de maljunaj arboj en stelan alton.

Kaj preskaŭ tiun saman momenton, —kvazaŭ ili nur atendis ĉi tion,—sennombraj voĉoj aliĝis al li, kaj tuta grandega urbo subite ektondris per solenaj akordoj de antikva himno al Diaĵo.

— Fine!—ekkriis la reĝo.

— Ho, fratoj!.. entuziasme ekmurmuretis la juna pastro, etendante la manojn en mallumon, plenan je majestaj sonoj.—Kia feliĉo!..

Solenaj, majestaj sonoj ĉiam kreskis, kreskis senfine... Ŝajnis, ke animo de la tuta homaro subite vekigis post maltrankvlla dormo de la tera vivo, kaj serena, triumfanta meze de l'uraganoj de solenaj sonoj, la animo eksupreniĝis ĉielon. Kaj ŝajnis, ke ekkantis la tuta tero, allogita, ĉarmita per tiu ĉi entuziasmo de homoj, ekkantis arboj, floroj, fontanoj, tonoj, nuboj, ekkantis ĉio, kio vivas, ĉio,

kio estas... Io dieca, timiga en sia majesteco, estis en tiu ĉi flugado de homoj en senfinecon...

„Ho, Patro, ni kantas gloron al vi! tondris nevideblaj ĥoroj.—Pardonu, Tutbona, al ni niajn pekojn, ne forlasu nin en momentoj de malforto kaj malĝojo... Tuta mondo estas Via regno, ho, Granda; sola ĝia leĝo de plej antikvaj jarcentoj, leĝo de vero, Via volo, sola bono estas amo!..“

Tondroj de la preĝo majeste supreniĝadis en la brilantan ĉielon, kaj ŝajnis al la maljuna reĝo, al ĉiuj tiuj ĉi mil-miloj da homoj, divenintaj fine la sencon de la oraj skribaĵoj, ke la tuta ĉielo estas ĉirkaŭprenita kaj tremas pro senlima entuziasmo. Brilantaj mondoj majeste naĝis antaŭ ili en senlima spaco, kaj ĉiu el tiuj ĉi belaj aeraj ŝipoj, similaj al multekostaj juveloj, portis sur si miriadojn da vivaj estaĵoj, tutan mondon da pensoj, sentoj, aspiroj kaj brulis per amo, per viva bela vivo... Kaj ŝajnis al homoj, ke tiun ĉi nokton ĉiuj tiuj ĉi miriadoj da estaĵoj sur tiuj ĉi miriadoj da steloj scias, sentas tion, kion scias kaj sentas nun iliaj malgrandaj homaj koroj: belecon kaj bonon de vivo, senfinan ĝian ĝojon. Kaj ĉiuj, ĉiuj ili—tiuj malproksimaj, sed proksimaj, parencaj estaĵoj, —kunvenis kune, ĉiu sur sia stelo, ĉiuj en festaj vestoj, en floroj, kaj etendas la manojn tra la senfinaĵo unuj al aliaj, karajn alvokantajn manojn, kaj kantas kune kun la tero, admirindajn himnojn al la vivo, al la amo kaj al la Fonto de tiu ĉi vivo-amo, al Granda Nekomprenebla. Tio estis festo de la tuta universo, de ĉio, kio vivas kaj spiras en ĝi...

Kaj la pastroj, kaj ĉiuj tiuj, kiuj ankoraŭ ne sciigis la Veron, eksciis en brilo de tiu ĉi amo, lumiginta l'universon, ke ili estis malvivaj, kaj, sciiginte tion ĉi, ili ekvidis en siaj animoj matenan ĉielruĝon de nova vivo...

Apenaŭ la himno silentiĝis, la maljuna reĝo, forgesinte sian aĝon, ekkuris sur la straton, al homoj. Elkurinte sur la larĝan marmoran ŝtuparon, kondukantan de la placo en la palacon, li ekvidis tion, kion li jam antaŭdelonge deziris tiel pasie: meze de feliĉa rido kaj de salutoj la homoj intersanĝadis fratajn kisojn.

— Fariĝis!..— ekkriis la reĝo kaj, levinte la okulojn al la ĉielo, li laŭte emocie elparolis: — Mi dankas Vin, Granda Dio, pro feliĉo, kiun Vi donacis al mi, pro la feliĉo vidi feliĉon de fratoj-homoj!..

Kaj, forlasinte sian marmoran palacon, la maljuna reĝo mallaŭte foriĝis en la mallumo de la nokto...

Kaj plu neniu iam vidis lin...

Maljuna saĝa Seid - Ebn - Al - Naman eksilentis, kaj ordiginte karbojn de estingiĝanta lignofajro, direktis sian malĝojan rigardon en la senliman dezerton...

— Sed pro kio homoj denove forgesis la leĝon de la ĉielo?—mi demandis post mallonga silento.— Pro kio ili ne estas plu fratoj?..

— Pro tio, ke ili ĉesis rigardi la stelojn, opiniante, ke tio jam ne estas necesa...—li respondis.— Kaj poste la aferoj de tero denove allogis ilin iom post iom, kaj denove, anstataŭ unu necesa eterna leĝo, ili faris sennombrajn

necesajn leĝojn kaj pereigis per ili la vivon... Sed—daŭrigis la maljuna arabo, kaj lia voĉo fariĝis pli varmega,—la tempo venos, kaj eble ĝi estas jam nemalproksima: denove iu sankta homo ekstaros inter la homoj por rememorigi al ili pri sola leĝo, leĝo de la ĉielo, por savi ilin... Kaj tio estos jam por ĉiam...

— Ĉu tio estos?—mi demandis nelaŭte.

— Rigardu la ĉielon!—Seido elparolis kun kvieta rideto anstataŭ respondo.

Mi levis la okulojn al la ĉielo, brilanta super la tranquilla nigra dezerto kaj tuj sendube sciigis, ke tio estos...

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

Internacia lingvo.

ВЪ ИЗДАНИИ „ПОСРЕДНИКА“.

- 1) Н. Кабановъ. Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкъ эсперанто. Цѣна 12 коп.
- N. Kabanov. Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo 12 sd.
- 2) Н. Кабановъ. Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна 25 коп.
- N. Kabanov. Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro. Dua eldono. Prezo 25 sd.
- 3) Н. Кабановъ. Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Второе изданіе. Цѣна 45 коп.
- N. Kabanov. Plena gramatiko de la lingvo esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa tradiko de la ekzercoj. Dua eldono. Prezo 45 sd.
- 4) Л. Л. Заменгофъ. Основы международного языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна 35 коп.
- L. L. Zamenhof. La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo 35 sd.
- 5) Н. Кабановъ. Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна 35 коп.
- N. Kabanov. La plej facila lingvo—Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo 35 sd.
- 6) Н. Кабановъ. Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна 40 коп.
- N. Kabanov. Rusa-esperanta vortaro. Prezo 40 sd.
- 7) Н. Кабановъ. Полный эсперантско-русскій словарь. Ц. 70 к.
- N. Kabanov. Plena esperanta-rusa vortaro. Prezo 70 sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ“ (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

ВСЕМІРНАЯ БИБЛІОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000988363

L. Tolstoj. Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.)
Prezo 5 k. (5 sd.).

„ Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).

„ Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.)
Prezo 25 k. (25 sd.).

„ Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).

„ Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 15 k. (15 sd.).

„ Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).

„ Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 35 k.
(35 sd.).

„ Kaŭkaza militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 20 k.
(20 sd.).

„ Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 15 k.
(15 sd.).

Naĵivin. Pri kio la steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.) Prezo 15 k.
(15 sd.).

Garŝin. Kvar tagojn sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)
Prezo 10 k. (10 sd.).

„ Signalo. (Сигналъ.) Prezo 10 k. (10 sd.).

„ Legendo pri fiero Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.) Prezo
10 k. (10 sd.).

Semjonov. Kortisto (kun autaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)
Prezo 10 k. (10 sd.).

Lastaj kvin tradukoj estas korektitaj de la anoj de Esper.
Literat. Asocio.

Estas presataj:

L. Tolstoj. Kredu al vi mem. (Вѣрьте себѣ.)

„ Amu unu alian. (Любите другъ друга.)

L. Tolstoj. Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj.
(1, 2, 3, 4 и 5 книжки для дѣтей).

V. Korolenko. La infanoj de la subteraĵo (Дѣти подземелья.)

Aksakov. Skarlata floreto. (Аленькій цвѣточекъ.)

Rusaj popolaj fabeloj. (Русскія народныя сказки.)

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik“ (Moskvo, Petrov-
skija linii) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turnin la ĉefan
librotenejon de la eldonoj de „Posrednik“: Moskvo, Arbato, 36,
al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва,
Арбатъ, 36. И. И. ГОРБУНОВУ.

Цѣна 15 коп.—Prezo 15 sd.